

HORIZONTO

KULTURA KAJ INFORMA REVUO
DE LA NEŬTRALA ĜSPERANTO-MOVADO

6-a Jaro N-ro 36 (6)
Novembro - Decembro 1981



*Andaluzia
Fervo*

U.E.A. ĈESIS PRISILENTI N.E.M.

ĤLIAJ PRUVOJ DE LA POLITIKIĜO DE TEJO

KONFIRMO PRI LA NEFUNKCIADO DE CED

8-a INTERNACIA KONFERENCO DE N.E.M. EN HISPANIO

HORIZONTO

KULTURA KAJ INFORMA REVUO
DE LA
NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO



Dumonata oficiala organo de la INTERNACIA
CENTRO de la NEŬTRALA ESPERANTO-
MOVADO (ICNEM).

Eldonata kaj presata de
ELDONEJO PERSPEKTIVO.

Ĉefredaktoro: *Jean Thierry*,
5 rue León Cogniet, F-75017 Paris, Francio

Redaktoro: *H. V. Rasmussen*,
Bygtoften 8, DK-2800 Lyngby, Danio.

Ĉiujn artikolojn kaj aliajn kontribuojn por la
revuo bonvolu sendi *nepre* al la ĉefredaktoro.
La redakcio rezervas la rajton mallongigi la
tekstojn kaj korekti la lingvon.

Abonojn akceptas la perantoj de HORIZONTO
aŭ rekte la ELDONEJO PERSPEKTIVO,
Nørregårdsvej 91, DK-2610 Rødovre, Danio.
Postĉekkonto: Kopenhago 9 32 95 95.

Jara abono por ĉiuj landoj: 100 danaj kronoj
aŭ ronda egalvaloro. Tiu abono ne inkluzivas
membrecon de ICNEM. Vidu la antaŭlastan
kovrilpaĝon.

Por recenzo bonvolu sendi 2 ekzemplerojn, por
mencio 1 ekzempleron de libro aŭ broŝuro.
HORIZONTO akceptas ankaŭ **anoncojn**
laŭ la suba tarifo:

1/1 paĝo 200 dkr., 1/2 paĝo 100 dkr. kaj
1/4 paĝo 50 dkr.

ENHAVO

U.E.A. Ĉesis Prisilenti N.E.M. (H.V. Rasmussen)	121
Jarfina Numero	124
Esploro kaj Dokumentado (ED) (Prof. d-ro Ivo Lapenna)	125
Kelkaj Komentoj pri la Radio-Elsendoj en Esperanto (Ivo Lapenna)	129
Norda Printempo (Zora Heide)	132
Esperanto en Radio	134
Radio Vieno	135
Lingva Angulo	136
Mallonge el la tuta Mondo	139
Ekrigardo al Esperanto (Richard Schulz) .	141
8-a Internacia Konferenco de N.E.M.	142

Frontpaĝa bildo. Salute al la lando de la 8-a
NEM-konferenco, Hispanio, ni prezentas la
desegnaĵon, *Andaluzia Febro*, de *Lisbeth Lin-*
nemann (vidu p. 123).

PERANTOJ

Aŭstrio:

D-ro Klaus Perko, Lendkai 111, A-8020 Graz.
Pĉk. Graz 1257.845. Jarabono: 230 ŝil.

Britio:

Geoffrey King, 12 Elmer Close, Enfield Mid-
dlesex EN2 7EZ. Pĉk. 37.507.9106.

Jarabono: 7 anglaj pundoj.

Danio:

Eldonejo Perspektivo, Nørregårdsvej 91,
DK-2610 Rødovre. Pĉk. 9 32 95 95.

Jarabono: 100 d.kr.

Francio:

Marie Thierry, 5 rue León Cogniet,
F-75017 Paris, Francio.

Jarabono: 75 ffr.

FR Germanio:

Rudolf Helmke, Wiesenstrasse 9, D-4773
Möhnesee-Günne. Konto Nr. 31 377 450
Sparkasse Möhnesee (BLZ 414 514 85).

Jarabono: 33 DM.

Grekio:

Adda Sakellaroupoulou, Sokratous 88, Omo-
nia, Ateno 101. Jarabono: 380 dr.

Hispanio:

Luis Hernández-Yzal, D-ro Zamenhof St. 12,
San Pablo de Ordal (Barcelona).

Jarabono: 600 pesetoj.

Israelo:

Ben-Alter Jehiel, P.O.B. 379, Petah Tikva. Pĉk.
Bank Hadoar, 4-45854-8.

Jarabono: 120 shekel.

Jugoslavio:

Prof. d-ro Oton Pancer, Vočarsko Naselje 10,
YU-41000 Zagreb. Jarabono: 200 n.din.

Kanado:

Kriss Smilga, 34 Martin Road. Toronto Ont.
M4S 2V2. Jarabono: 20 dol.

Luksemburgo:

Albert Wickler, 1 rue de Kehlen, L-Olm. Pĉk.
54175-49. Jarabono: 540 lfr.

Nederlando:

Marianne Vermaas, Nieuwe Binnenweg 70, I.R.
3015 BC Rotterdam Jarabono: 36 n.gld.

El ĉiuj aliaj landoj oni pagu al la Administracio
aŭ al unu el tiuj perantoj, ĝis peranto en tiu
lando estos trovita.

GRAVA RIMARKO: Oni akceptas abonojn
nur por la tuta kalendara jaro.

U.E.A. ĈESIS PRISILENTI N.E.M.

Ĝenerala Kunsido de la Universala Kongreso en Brazilio pritraktis la Raporton pri la jaro 1980 prezentitan de la estraro de UEA en la maja numero de la revuo *Esperanto*. La raporton komentis Prof. D-ro Ivo Lapenna en la antaŭa numero de *Horizonto*, p. 105-114. En la septembra numero de *Esperanto* estas sur p. 153 tre mallonga referaĵo pri la Ĝenerala Kunsido. El tiu ni citas:

"La plej longan, 20-minutan, intervenon faris s-ro F. Simonnet (Francio), kiu montriĝis esti heroldo de la t.n. "Neŭtrala Esperanto-Movado" kaj ties konferenco, kiu arigis kelkdekon da partoprenantoj en Danlando iom antaŭ la Kongreso. La elpaŝo de s-ro Simonnet estis, unuflanke, provo reklami la gazeton *Horizonto*, aliflanke peno pruvi, ke UEA "devojiĝis aŭ estas en danĝero de devojiĝo". Ĉio ĉi ligiĝis al alvoko per kiu la menciitaj gazeto kaj konferenco volus meti sin centre de la preparoj por la Jubilea Jaro 1987. Citante el la redakcia rubriko "Vi trovos" de nia junia numero, la parolanto postulis klarigon, ĉu la Estraro staras malantaŭ la tie uzitaj vortoj pri la aluditaj gazeto kaj movada grupo. Respondis la prezidanto de UEA kaj klarigis, ke la Estraro, same kiel ĉiuj aliaj legantoj, informiĝas pri la enhavo de nia revuo nur post ĝia apero. La Estraro eble ne staras malantaŭ la uzitaj esprimoj, sed ĝi en ili ne vidas misinterpreton de la asocia politiko. Maertens atentigis, ke UEA respektas la aliajn movadajn organizaĵojn kaj atendas similan respekton iliaflanke."

Tio estas preskaŭ historia dokumento. Dum la jaroj ekde la ekagado de la Neŭtrala Esperanto-Movado *Esperanto* zorge evitadis mencii la nomon de NEM kaj de ĝia organo *Horizonto*, kaj la cenzuro de UEA malakceptis ĉian esprimon de la vidpunktoj de NEM en *Esperanto*. Nun, do, oni malkaŝe diras, ke ekzistas NEM, ke ĝi havas sian propran organon, *Horizonto*, kaj ke ĝi okazigas internaciajn konferencojn. Tio eble estas konkretigo de la vortoj de la UEA-prezidanto, s-ro G. Maertens, ke "UEA respektas la aliajn movadajn organizaĵojn". Se jes, ni rajtas esperi pri malfermo de fruktodona dialogo inter UEA kaj NEM pri la movadaj demandoj.

Ke UEA ne devas vane atendi pri simila respekto niaflanke, jam pruvas la fakto, ke UEA estis invitita partopreni la konferencon en Humlebæk por kun NEM kaj aliaj priparoli, ĉu komuna agado pri la celebrado de la 100-jara jubileo de Esperanto estos ebla. Vidu pri tio p. 98 de la antaŭa numero de *Horizonto*.

Kun bedaŭro oni devas tamen konstati, ke la citaĵo enhavas misprezenton de la intencoj de NEM asertante, ke "la menciitaj gazeto kaj konferenco volus meti sin centre de la preparoj por la Jubilea Jaro 1987". Se la verkinto estus konsciencie leginta la Skizon de Baza Programo, li estus konstatinta, ke tiu proponas nur, ke estu fondita *Internacia Organiza Komitato por la Esperanto-Jaro 1987 (IOK 87)*,

konsistanta el reprezentantoj de ĉiuj internaciaj Esperanto-organizaĵoj kaj de ĉiuj institucioj kaj instancoj, kiuj uzas la Internacian Lingvon por siaj celoj", kiel oni povas legi en art. 2.1 de la Skizo. Se la vortoj de s-ro Maertens estis sinceraj, oni devas malgratuli al li, ĉar unu el liaj kunlaborantoj tiel ŝajngas lian eldiron sensenca.

Kaj rimarku ankaŭ la majstraĵon de nebuligo: "La Estraro eble ne staras malantaŭ la uzitaj esprimoj, sed ĝi en ili ne vidas misinterpreton de la asocia politiko"! La kritiko de NEM pri la redakcia noto sub "Vi trovos" (vidu p. 97 kaj 99 de la antaŭa numero de *Horizonto*) ja evidente ne rilatis al misprezento de la politiko de UEA, sed al misprezento de la intencoj de NEM, kaj estas tute nedubinde, ke Prof. Simonnet pritraktis tiun demandon en tute nemiskomprenebla maniero. La UEA-estraro eble ne staras, sed eble ankaŭ jes staras malantaŭ la misprezento rilate al NEM. Kio estas la vero, oni ne vidas laŭ la referaĵo.

Cetere estas rimarkinde, ke la referaĵo tute ne informas, ke estas ellaborita Skizo de Baza Programo, kaj ke ĝia aŭtoro estas Prof. D-ro Ivo Lapenna, kiu kiel estrarano kaj poste prezidanto de UEA gvidis aliajn kampanjojn de UEA kaj la cetera Esperanto-movado por manifesti la taŭgecon kaj valoron de Esperanto kaj faris tion sukcese. Tiu signo de etanimeco enhavas, tamen, ankaŭ en certa senco pozitivajn. Antaŭe oni de pluraj flankoj volis kredigi, ke la ekagado de NEM estas nura rezulto de malkontenteco de Prof. Lapenna pro tio, ke li ne plu estas prezidanto de UEA. Oni povus atendi ripeton de tiu aserto, des pli, ĉar nun de pli ol unu jaro funkcias la organizaĵo Internacia Centro de la Neŭtrala Esperanto-Movado kun Lapenna kiel prezidanto. Tamen, tiun eblecon *Esperanto* ne volis utiligi, ĉar ĝia redakcio estas sufiĉe realisma por kompreni, ke tia argumentado ne taŭgus.

La fakto estas, ke en ICNEM kolektiĝis esperantistoj, kiuj estas kompare kun UEA malmultnombra grupo. Sed tiuj homoj kolektiĝis ne laŭ nebulaj ideoj pri subteno al Esperanto kaj unueco malgraŭ ĉio. Ili klare konscias pri tio, ke necesas, ke ekzistu movado kaj organizaĵo, kiuj observas neŭtralecon en partipolitika kaj aliaj rilatoj. Ili elektis en Strasburgo pasintjare Prof. Lapenna kiel prezidanto, ĉar li estas la plej sperta kaj kompetenta persono por tiu tasko. Li mem ne deziris esti prezidanto, sed proponis alian personon, kiu rifuzis, ĉar li kiel la aliaj ĉeestantoj insistis, ke Prof. Ivo Lapenna restu la gvidanto de la movado bazita sur Humaneca Internaciismo. Simila situacio estis ĉi-jare en Humlebæk (antaŭa numero, p. 103).

Preparoj de UEA por la Esperanto-Jaro 1987

La septembra numero de *Esperanto* estas tre avara koncerne informojn pri la ĝisnuna aktiveco de la asocio por prepari la jubilean jaron. Ni vane serĉis en tiu

numero sciigon pri nomigo de membroj por la Komisiono por la 100-jara datreveno, kiu laŭ p. 20 de la UEA-jarlibro 1981 estas nomota (antaŭa numero p. 99).

Sur p. 149 de la menciita numero de *Esperanto* oni legas, ke la Komitato en Brazilio akceptis 17 rezoluciojn, el kiuj du estas publikigitaj en la sama numero, inter ili tamen ne tiu pri la "Centjara Jubileo 1887-1987".

Sur p. 150 estas jena informo: "Aparta komitata dokumento rilatas la "Planon por la periodo 1983-1987", kiun la Estraro ellaboris en 1979 kaj reekzamenis dum sia marta kunsido ĉi-jare. Ankaŭ la Komitato konsideras tiun planon "malneto", ĉar la ideo estas vaste diskutigi ĝin, ne nur kun aliaj Esperanto-organizaĵoj sed ankaŭ kun unuopuloj pretaj kunlabori. Ni intencas amplekse prezenti la planon en la oktobra numero". Pri la kunsidoj de la UEA-estraro *Esperanto* informis (p.150) i.a.: "Ĉio enestis tiun tagordon. Ĉio de la fundamento de la roterdama domo ĝis la Jubilea Jaro 1987". Ĉu fakte la Estraro pritraktis tiun lastnomitan tagordan punkton kaj rilate al ĝi la iniciaton de NEM, ne estas dirite, kaj kelkajn liniojn antaŭe estas skribite, ke oni "sukcesis tralabori nur parteton de la ampleksa tagordo".

Estas en certa senco kompreneble, ke UEA ĝis nun tiel obstine prisilentadis NEM, sed kiu povas klarigi, kial oni ne pli frue malkaŝis, ke la Estraro jam en 1979 ellaboris planon por la periodo 1983-1987, se tiu plano enhavas ankaŭ celebradon de la 100-jara jubileo? Kial la alvoko de NEM al la konferenco en Humlebæk pri tiu jubileo ne provokis la Estraron de UEA publikigi sian eventualan skizon de baza programo?

Eble la oktobra numero de *Esperanto* enhavos la dezirindajn informojn kaj respondojn. La antaŭaj sarkasmetaj - absolute ne galaj - rimarkoj ne signifas, ke NEM retiris sian etenditan manon. NEM plu estas preta por kunlabori kun UEA kaj ĉiuj aliaj Esperanto-organizaĵoj kaj -instancoj pri la preparoj por la jubileo, la evento, kiu havas la saman gravan intereson al ĉiuj esperantistoj kaj tial devus havi la kapablon unuigi ilin pri la solvo de tiu tasko malgraŭ ĉiaj diferencoj de opinioj rilate al aliaj demandoj.

H.V. Rasmussen.

SUDE DE PIRENEOJ

La venontjara 8-a Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado okazos en Hispanio. Tial por la frontpaĝo estis elektita *Andaluzia Febro*, kiu bone reprezentas la ĉarman desegno-arton de la dana artistino *Lisbeth Linnemann*. Ŝi ilustris multajn librojn de sia edzo, *Willy-August Linnemann*, unu el la plej famaj nuntempaj verkistoj en Danio, kaj la elektita desegnaĵo estas unu el ŝiaj ilustraĵoj ornamantaj lian esearon *Syd for Pyrenæerne* (Sude de Pireneoj).

JARFINA NUMERO

La titolo estas ĝusta, kvankam je la skribado de tiuj ĉi linioj restas ankoraŭ pli ol tri monatoj ĝis la jarfino, ĉar tiu ĉi numero de *Horizonto* estas la lasta de la unua jarkolekto en la dania periodo de la revuo. Je tiu okazo la redakcio deziras esprimi kontentecon pri la unua jaro, ĉar estis eble krei sufiĉe belaspektan kaj bonenhavan revuon, kvankam la redaktoroj kaj teknikaj kunlaborantoj ne estas profesiuloj tiurilate.

Dankon meritas la *Eldonejo Perspektivo*, kiu havigis al si maŝinojn por la presado de la revuo kaj malavare disponigas senpage laborhorojn kaj maŝinajn servojn por la produktado de la revuo, kaj tiel ricevas kompenson nur por la materialaj elspezoj. La eldonejo ĵus anstataŭigis la ĝisnunan presmaŝinon per nova por tiel plibonigi la teknikan kvaliton.

La kontenteco, kompreneble, estas ŝuldata ankaŭ al la bonaj manuskriptoj, kiujn la redakcio ricevas de pluraj aŭtoroj, kiuj same ne ricevas honorarion. Precipe ni dankas al la prezidanto de ICNEM pro liaj tre valoraj kontribuoj, inter kiuj estas ĉefe menciinda la rubriko *Esploro kaj Dokumentado* prezentanta la faktojn, kiuj estas la kaŭzoj de la neceseco por aktivadi en la Neŭtrala Esperanto-Movado.

Ni devas aldoni, ke ne nur membroj de ICNEM kaj aliaj partoprenantoj de NEM kontribuas al la produktado de *Horizonto*. Pluraj neesperantistaj simpatiantoj konsiderinde helpas pri solvo de teknikaj kaj aliaj problemoj. Por mencii nur unu ekzemplon: la ĉarmaj desegnaĵoj, kiujn vi de tempo al tempo vidas - en tiu ĉi numero la ilustraĵo de la poemo de Zora Heide - estas faritaj de tre simpatia kaj juna artisto, *Ralph Østrup*.

Do, la redakcio rigardas optimisme la estontecon de *Horizonto* kaj ankaŭ de ICNEM. La sekretario-kasisto informis, ke la financa situacio ne estas malbona, ĉar la Centro ne bezonas peti pri ekonomia helpo. La membroj mem proprainiciate sendas siajn mondonacojn. Ekzemple ĵus alvenis 1.000 dkr. de unu membro kaj 1.800 dkr. de alia membro. Tiaj donacoj estas treege bonvenaj, kaj la Plenuma Komitato ne havos problemojn por trovi taŭgajn manierojn por la elspezado, precipe por varbado de abonantoj de *Horizonto* kaj membroj de la Centro.

Sendube la plej efika metodo de varbado estas la persona, tiel ke jamaj abonantoj kaj membroj inter siaj konatoj kaj amikoj kreas intereson por la revuo kaj la organizaĵo. Sed estos utile subteni tiun laboron per verbaj prospektoj kaj reklamoj en aliaj gazetoj.

Dankon, do, al membroj kaj abonantoj. Dankon, ĉar per via sinteno vi pruvas konscion pri tio, ke *Horizonto* ne estas la revuo de la redakcio aŭ de la Plenuma Komitato de la Centro, sed ke ĝi ja estas via!

ESPLORO KAJ DOKUMENTADO (ED)

Redaktas Prof. D-ro IVO LAPENNA

N-ro 35

56. SENŜANGE SUB NOVA NOMO

Laŭ *Esperanto*, n-ro 7-8/81, la nomo de "Centra Laborrondo Esperanto en GDR" estas ŝanĝita al "Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR". La ŝanĝo de la nomo estas farita ne de la esperantistoj, sed de la prezidio de Kulturligo de GDR. La nova nomo eble kredigos iujn naivulojn, ke temas pri iu nova, sendependa Esperanto-Asocio en GDR. Fakte, ĉio restis absolute la sama kiel antaŭe: instanco de la ŝtata-partia Kulturligo, aganta plene laŭ la programo kaj konkretaj instrukcioj de la orientgermana Komunista Partio, siavice senkondiĉe dependa de la sovetia ŝtata-partia linio. Tion eksplicite konfirmas la ĉefartikolo en *der esperantist*, n-ro 2/81, en kiu la 26-a Kongreso de la KP de Soveta Unio estas ligita al la X-a Partia Kongreso de GDR, kaj la "klaraj celoj" de la lasta altrudas konkretajn taskojn ankaŭ al Kulturligo kaj ĉiuj ĝiaj instancoj, inter kiuj la Laborrondo, nun Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR. Ĉar tiu partipolitika instanco estas "aliĝinta asocio" de UEA, estas tute klare, ke, kiel ĝis nun, ĝi klopodos realigadi la novajn taskojn ankaŭ en UEA.

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 18.2.1.2 de Esperanto en Perspektivo (EeP).

57. PLIAJ PRUVOJ DE LA POLITIKIĜO DE TEJO

57.1. Celoj de MFDJ kaj TEJO: "Grandparte la Samaj"

En *der esperantist*, n-ro 1/81, aperis intervjuo de András Lukács, junulara delegito (JD) kaj fakdelegito (FD) de UEA en Budapeŝto, kun "la 30-jara ĉilia komunisto E.O. Fernandez", la prezidanto de la t.n. Monda Federacio de Demokrata Junularo (MFDJ). Tiu intervjuo estis unue publikigita en *Budapeŝta Informilo*, n-ro 4/80, unu el la organoj de HEA, plia partipolitika "aliĝinta asocio" de UEA.

El la intervjuo vidiĝas, ke la prezidanto de MFDJ scias tre malmulte pri la lingva problemo en la mondo kaj nenion pri Esperanto, malgraŭ la plurjara "kunlaboro" kun TEJO, la junulara sekcio de UEA. El tiu vidpunkto ĝi estas senvalora. Valora estas nur la konfeso pri la vera partipolitika karaktero de la rilatoj inter MFDJ kaj TEJO. Interalie, la intervjuito diris, ke "la celoj de MFDJ kaj tiuj de TEJO estas grandparte la samaj".

57.2. IUS kaj TEJO

Laŭ *Budapeŝta Informilo*, n-ro 11/80, kaj *der esperantist*, n-ro 1/81, András Lukács kaj Sándor Revesz, reprezentantoj de la junulara sekcio de UEA, dum du tagoj vizitis en Prago la sidejon de Internacia Unuiĝo de Studentoj (IUS), kie ili estis akceptitaj de la prezidanto kaj tri vicprezidantoj de IUS. Laŭ la informo, la funkciuloj de IUS "konfirmis la pretecon de IUS evoluigi kaj fortikigi la kunlaboron inter IUS kaj TEJO".

57.3. Kio estas MFDJ kaj IUS?

En ĉap. 4.3 de *Hamburgo en Retrospektivo* troviĝas detaloj pri tiuj du partipolitikaj organizaĵoj. Ĉi tie estu nur dirite, ke ambaŭ apartenas al la grupo de t.n. "parakomunistaj organizaĵoj" de sovetia speco, t.e. plene dependaj de Moskvo. MFDJ estis fondita en 1945. Misgviditaj de la vorto "demokrata" en la titolo, en la komenco multaj fakte demokrataj junularaj organizaĵoj aliĝis al ĝi. Kiam ili post nelonge konstatis, ke MFDJ estas nek demokrata, nek celas proksimigi la gejunulojn de ĉiuj landoj, sed agadas kiel instrumento de porsovetia propagando, ili povis fari nenion alian ol ekŝiĝi, ĉar montriĝis, ke per lerta manipulado la sovetiistoj ekkaperis ĉiujn decidajn poziciojn. Ĝis 1951 la sidejo estis en Parizo. En tiu jaro la franca registaro elpelis ĝin pro subversaj (subfosaj) politikaj agadoj kaj la sidejo estis translokigita en Budapeŝton, kie ĝi plu troviĝas kaj kie ankaŭ UEA nun havas dependan "sciencteknikan oficejon" (v. eron 53 de tiu ĉi rubriko). IUS havas identajn celojn, sed ĝi kampanjas unuavice inter la studentaro. Ĝia sidejo estas en Prago.

Ambaŭ organizaĵoj havas intimajn reciprokajn rilatojn. MFDJ, IUS kaj aliaj parakomunistaj internaciaj organizaĵoj kampanjas por la sovetia koncepto de monda paco (*pax sovietica*) kaj "kontraŭ imperialismon", "kontraŭ koloniismon", "kontraŭ la neŭtronan bombon", sed nur "en Okcidenta Eŭropo", ktp. laŭ la konata linio en la t.n. "ideologia lukto". Estas bone ripeti, ke en 1950, lige kun la konflikto inter Stalin kaj Tito, MFDJ kaj IUS eksigis siajn respektivajn jugoslaviajn sekciojn el la du organizaĵoj per rezolucioj, en kiuj la jugoslaviaj gejunuloj estis deklaritaj "*perfiduloj de la afero de la paco kaj demokrateco*" kaj "*dizertintoj fuĝintaj en la tendaron de imperialistaj militistoj*". Tiel.

Jen, do, la internaciaj "demokrataj" organizaĵoj, kies celoj estas "grandparte la samaj", kiel tiuj de TEJO, kaj kiuj konfirmis la pretecon eĉ pli evoluigi kaj fortikigi la kunlaboron kun la junulara sekcio de UEA. Ĉio ĉi okazas sen kontraŭstaro, do kun konsento de la posthamburgaj gvidantaroj de UEA, sen rezisto fare de la membraro de UEA/TEJO, eĉ sen kia ajn protesto de Jugoslavia Esperanto-Ligo aŭ de ĝia junulara sekcio, kies membrojn, kiel parton de la jugoslavia junularo, la du organizaĵoj kalumnie insultis.

Ĉu surprize, ke sendependaj politiksciencaj institutoj kaj aliaj instancoj ekster la Esperanto-Movado konstatas la kreskantan unudirektan poliŝikiĝadon de UEA ekde la eventoj de 1974?

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 18.2.1 de EeP kaj ĉap. 4.2 kaj 5 de Hamburgo en Retrospektivo.

58. IOM PLI PRI M.E.M.

58.1. Nova n-ro de "Paco"

Meze de 1981 aperis la n-ro por 1980 de *Paco*, bulteno de la MEM-Sekcio de GDR, Kulturligo de GDR (asocia sidejo: Centra Laborrondo Esperanto). La grandformata, 40-paĝa kajero, presita sur luksa papero kaj riĉe ilustrita estas preskaŭ komplete dediĉita al partipolitika propagando kaj laŭdado de ĉio sovetia, inkluzive la invadon de Afganio, kaj al atakado de NATO kaj de la okcidentaj demokratioj, ĉio laŭ la konata sovetia politika linio. En la cetera parto troviĝas bona artikolo de Eliza Kehlet "Denaskaj Esperantistoj", represita el *Kontakto* n-ro 60/78, kaj misprezenta artikolo pri la SAT-Kongreso de 1926 en Leningrado kun piednoto de la redaktoro, ke SAT "tiamtempe estis progresema", kio implicas, ke nun ĝi estas "reakcia" (!)

La eldoninto estas Centra Laborrondo, nun Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR, samtempe "aliĝinta asocio" de UEA. La respondeca redaktoro estas D-ro D.Blanke, komitatano de UEA, membro de la estraro de ĝia CED (fakte ne funkcia) kaj membro de ĝia Komisiono pri Planado (de kiu oni plu atendas konkretan planon).

58.2. M.E.M. ĉe la Monda Parlamento de Popoloj

Tiu "parlamento", fakte plia instrumento de sovetia propagando, okazis dum septembro 1980 en Sofio. La delegacio de MEM konsistis el kvin membroj sub la gvido de N.Aleksiev, honora prezidanto de MEM kaj nun ankaŭ honora membro de UEA (pri la "meritoj de N. Aleksiev por UEA v. eron 52.2 de tiu ĉi rubriko en *Horizonto*, n-ro 35 (5) 1981, p. 105): V.Oljanov, alia membro de la delegacio, estas delegito (D) kaj fakdelegito (FD) de UEA en Sofio, samtempe ankaŭ ĉefredaktoro de *Paco* kaj membro de la Sekretariato de MEM.

La supraj du informoj jetas plian lumon sur la ligojn, ankoraŭ ne formaligitajn, inter MEM kaj UEA. Vere ne estas surprize, ke sendependaj politiksciencaj institutoj kaj aliaj instancoj ekster la Esperanto-Movado konstatas la kreskantan unudirektan poliŝikiĝon de UEA ekde la eventoj de 1974.

Ankaŭ tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 18.2.1 de EeP kaj ĉap. 4.2 kaj 5 de HeR.

59. IEAJ NE EKZISTAS – LAŬ LA JARLIBRO DE U.E.A.

Sur p. 63 de la *Jarlibro* de UEA por 1981 (publikigita en julio) troviĝas listo de internaciaj Esperanto-Organizaĵoj ne ligitaj kun UEA. Estas donitaj koncizaj informoj pri SAT kaj ĝiaj organoj, pri MEM kaj pri kvin aliaj organizaĵoj, inter kiuj ankaŭ Ligo de Samseksamaj Geesperantistoj, sed estas komplete ellasitaj ne nur la Internacia Centro de la Neŭtrala Esperanto-Movado kaj ĝia organo *Horizonto*, sed ankaŭ Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj (IEAJ), daŭre funkcianta ekde la fondiĝo en 1957, kaj de ĝia organo *Internacia Jura Revuo*, la plej prestiĝa kaj plej grava faka Esperanto-periodaĵo en la nuntempa Esperanto-Movado. Ne estas klare, ĉu tiuj ellsaĵoj estas faritaj laŭ kaprica decido de la ĉefuloj en la CD de UEA, aŭ laŭ instrukcioj de la Estraro. En ĉiu okazo plia prisilento de faktoj. Al kiu utilas tio?

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 16.4 kaj 16.2.2 de EeP.

60. KONFIRMO PRI LA NEFUNKCIADO DE CED

Jam delonge ni konstatis, ke post Hamburgo CED ĉesis funkcii (interalie, en *Hamburgo en Retrospektivo*, p.79 de la dua eldono, 1979, kaj en ero 52.3 de tiu ĉi rubriko en *Horizonto* n-ro 35(5). 1981, p.106). Nun estrarano de tiu nefunkcianta, pure surpapera CED, Detlev Blanke, konstatas esence la samon en cirkulero de la 6-a de februaro, 1981, kiun ni ĵus tralegis. Jen kelkaj eltiraĵoj:

"...Mi vane serĉis en la resumo /de la Estrara Raporto/ ion konkretan pri CED kaj pri planado" - "La 9 elektitaj 'CED-estraranoj' ekde aŭgusto /1980/ atendas vane iujn signojn, informon, stimulon..." - "La Estraro ne disponas pri klara strategio kaj taktiko, se temas pri la rolo de la scienco en la antaŭenigo de Esperanto" - "Tiu situacio...klarigas la pasivecon, se ne paroli pri kaoseco, pri CED" - "Oni komencis iujn projektojn kun pompaj anncioj (CED-rubriko en 'Esperanto'), poste forgesis aŭ ne plu interesiĝis pri ili. Tio estas komplete neserioza situacio por 'scienca' institucio kiel CED" - "LPLP /la trompa, kvazaŭa daŭrigo de la iam prestiĝa revuo de CED *La Monĉa Lingvo-Problemo*/ komplete glitis el niaj manoj...La esperantlingvaj resumo mizeriĝis aŭ tute malaperis..."

Rimarko: En la supra teksto la partetoj en rektaj krampoj /.../ estas niaj aldonoj por komprenigi la sencon de la citaĵo, dum la parteto en rondaj parenlezoj (...) troviĝas en la originalo.

Ne necesas kia ajn komento. Oni nur povus demandi sin, ĉu D-ro D. Blanke, mem estrarano de tiu praktike neekzistanta CED, ne sentas kunrespondecon pro tiu mizera stato, al kiu la posthamburgaj gvidentaroj de UEA reduktis tiun iam floran institucion, al kies agadoj grandparte ŝuldiĝas la antaŭhamburgaj atingoj.

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 20.2 de EeP.

KELKAJ KOMENTOJ PRI LA RADIO-ELSENDOJ EN ESPERANTO

En la pasintaj julio kaj aŭgusto mi ĉiusemajne aŭskultis almenaŭ kelkajn Esperanto-elsendojn de tiuj radio-stacioj, kiuj estas aŭdeblaj en Londono per iu el miaj radio-aparatoj kun mallongaj kaj mezaj ondoj. Tre bone kaj kontentige estis aŭdeblaj Radio Polonia (Varsovio), Berno, Vatikano, Zagrebo kaj Pekino, tre malbone Vieno, dum Romo estis nekaptebla, malgraŭ pluraj paciencaj provoj. La aliaj stacioj - Rio de Janeiro, Sabadell, Sorocaba kaj Valencio - estas aŭdeblaj nur loke kaj mi eĉ ne provis aŭskulti. Sekve, la subaj komentoj baziĝas sole sur la aŭditaj programoj en la menciita periodo.

Unue iom pri la enhavo:

Se oni konsideras, ke *Radio Polonia* havas Esperanto-elsendojn tri fojojn tage kaj ke ĉiu programo daŭras duonhoron, ne estas surprizaj la riĉeco kaj varieco de la enhavo. Tiun stacion mi denove aŭskultis post intervalo de pli ol unu jaro kaj notis kun plezuro, ke la politikaj analizoj pri la enlanda situacio fariĝis konsiderinde pli elastaj. Tio sendube ŝuldiĝas al la konata evoluo komenciĝinta fine de aŭgusto 1980. Male, la pritrakton de eksterlandaj eventoj plu markas rigideco pro la strikta observado de la politika linio de Moskvo. La aliaj partoj de la programoj, inkluzive la muzikajn erojn, estas bonaj, kelkaj eĉ tre bonaj, sed multaj el la mesaĝoj de la aŭskultantoj povus glate esti ellasitaj. Kial, ekzemple, "pacamanto" el GDR ne povus skribi simplan poŝtkarton al sia pola korespondanto-"pacamanto" por pardonpeti pro nerespondo al ties letero, anstataŭ utiligi tiucele la multekostajn "ondojn de Radio Polonia"?

Radio Pekino, kiu nun disaŭdigas ĉiutage kvar duonhorajn programojn, havis kelkajn interesajn elsendojn pri gigantaj plantoj en Ĉinio, pri la muzeo de Sun Jat-Sen kaj similaj aferoj, sed estus eĉ pli interese aŭskulti iom pli detalajn informojn pri ekonomikaj, politikaj, sociaj kaj juraj problemoj en PR Ĉinio, kaj komentojn pri la monda politiko.

Radio Zagrebo regule prezentas selektitajn novaĵojn el Jugoslavio. Ĝi faras tion tre bone, se oni konsideras, ke la redakcio disponas pri nuraj 15 minutoj semajne.

Kompreneble, la tri menciitaj stacioj esprimas la oficialajn starpunktojn de siaj respektivaj registaroj en ĉiuj demandoj de interna kaj eksterlanda politiko;

Zagrebo, sporade, ankaŭ la pozicion de la t.n. "tria mondo". Aliflanke, *Radio Vatikano* (dufoje semajne, entute 25 minutoj), kiu traktas ĉefe religiajn aferojn, ofte samtempe tuŝas iliajn politikajn aspektojn (ekzemple, en la raporto pri la religiaj persekutoj en Albanio), kaj kelkfoje ankaŭ koncize analizas gravajn problemojn de la monda politiko el vidpunkto de Vatikano (ekz. la programo pri la du blokoj kaj la tria mondo). Fine, *Radio Berno* (kvarfoje semajne, entute dum 40 minutoj) dediĉas sin unuavice al Svislando, ĝiaj demokrataj institucioj, turismo, fervojoj, ŝoseoj, ktp., sed en julio ĝi klare prezentis en pluraj elsendoj ankaŭ la homaranismon kaj hilelismen de Zamenhof.

Se la Esperanto-elsendoj de Zagrebo, Vatikano kaj Berno (eble ankaŭ Romo kaj Vieno) daŭrus same longe, kiel tiuj de Varsovio kaj Pekino; se, krome, Pekino kaj Berno dediĉus pli da atento al la monda politiko; se, aldone, troviĝus iu stacio, kiu reprezentus la starpunkton de la alianco de demokrataj ŝtatoj (NATO) kaj alia stacio tiun de EEK, oni atingus kontentigan ekvilibron inter la diversaj konceptoj pri la karaktero de la nuntempaj internaciaj rilatoj. Pro la for-esto de la "seoj", tiurilate plu abunde superregas la starpunkto esprimata de Radio Polonia, praktike identa al tiu de Sovetunio.

Ĉiuj stacioj informas en iuj el la programoj ankaŭ pri la okazaĵoj en la Esperanto-Movado. Bona estas la rubriko "Tra la Esperanto-Gazetaro" de Radio Zagrebo, en kiu ankaŭ *Horizonto* kaj la aktivadoj de la sendependa neŭtrala Esperanto-Movado estis plurfoje menciitaj. Surprize, Radio Polonia, kiu en la antaŭaj jaroj ĉiutage abunde raportadis pri la universalaj kongresoj de Esperanto, ĉi-foje dum la tuta kongresa semajno nur unufoje supraĵe menciis ĝin. Ankaŭ la aliaj stacioj, kun la escepto de Zagrebo, apenaŭ ion diris pri la UK, la Konferenco de N.E.M. en Humlebæk, la SAT-Kongreso kaj aliaj internaciaj renkontiĝoj - almenaŭ ne en la aŭskultitaj programoj. Neniu el la stacioj faris kian ajn kritikan analizon de la situacio en la Esperanto-Movado, sed limigis sin al informoj ĉerpitaj grandparte el la Esperanto-gazetaro, kelkfoje legitaj jam antaŭ kelkaj monatoj. Ĝi estas grava manko. Almenaŭ du el la stacioj povus sukcese plenigi la vakuon.

Nun pri la lingvo:

Ĝenerale parolante, la lingvo de ĉiuj stacioj estas tre bona, la prononco klara kaj la voĉoj agrablaj. Tamen, ne ĉio estas tiel perfekta, kiel povus esti. Jen kelkaj bonintencaj rimarkoj:

Laŭ mia opinio la unuan premion el lingva vidpunkto meritas Radio Polonia. Dum la multhora aŭskultado mi notis nur unu erareton: *respeguli* anst. *speguli*. En la programoj de la aliaj stacioj estis pluraj eraroj, ŝuldataj ĉefe al la influo de la respektivaj naciaj lingvoj, ekzemple: *petrolo* anst. *nafto* en tiu kunteksto (petrolo estas derivaĵo de nafto); legi *sur* la gazeto anst. *en* la gazeto (kom-

preneble, oni povus legi en gazeto starante sur alia gazeto, sed tio ne estas tre kutima legpozicio); *arbitrado* anst. *arbitracio* aŭ *arbitraciado* aŭ *arbitracia proceduro*, depende de la kunteksto, kvankam ankaŭ *arbitracio* povas esti, escepte, *arbitra*; *noveloj* anst. *novaĵoj*; *Unuiĝinta Naciaro* anst. la jam delonge enkondukiĝinta *Unuiĝintaj Nacioj* (UN), des pli, ke en la sama programo oni parolis ankaŭ pri la antaŭmilita ligo de *Nacioj* kaj uzis por ĝi la ĝustan nomon; *skribas en la gazeto* anst. *estas skribite en la gazeto*; *direkte* anst. *rekte* en la koncerna kunteksto; *estas malpermesata* anst. *estas malpermesita*: se oni ion malpermesis, do ĝi estas malpermesita (alie la uzado de la pasivaj participoj en ĉiuj elsendoj estas bonega, laŭ la Fundamento). Eble estis ankoraŭ 2-3 eraroj aŭ eraretoj, sed mi ilin ne rimarkis. Kvankam la nombro de la eraroj estis vere malgranda, se oni konsideras la tuton de la aŭskultitaj programoj, tamen la koncernaj redakcioj evitu ilin kaj klopodu eviti similajn en la estonteco.

Kiel mi klarigis en *Retoriko* (precipe p-oj 151-153 de la tria eldono), la klarecon de iu lingvo grandparte kaŭzas la ofteco de la vokaloj. Ili estas sonoraj, donas muzikon al la lingvo kaj samtempe faras ĝin klara, kondiĉe, kompreneble, ke oni observu ĝiajn fonetikajn regulojn. La rimarkoj, kiujn mi povus tiurilate fari pri la Esperanto-elsendoj estas tiel neglekteblaj, ke mi preferas ne fari ilin. Iom alia afero estas la regulo, aplikebla nur al la parola lingvo, ke en kunmetitaj vortoj la flankelementoj konservas delikatan kromakcenton, dum la ĉefa akcento restas - superflue ĝin diri - sur la antaŭlasta silabo en plursilabaj vortoj: plŭv-ákv-o, fŭnto-plúm-o, ktp. Tio reliefigas la vorton, ritmigas la parolfluon (parŭl-flúon), donas pliajn klarecon kaj belsonecon al la lingvo. Krome, nur tiel oni kelkfoje povas eviti konfuzon kaj miskomprenojn. Ĉiuj stacioj observas tiun regulon, sed Radio Berno tute speciale: eĉ komencanto post 3-monata lernado povas klare aŭdi kaj kompreni ĉiun unuopan kunmetitan vorton, se li scias la signifon de la vortelementoj. Mi rimarkis eraretojn nur en la programoj de Radio Pekino, ekz. ĉellarko anst. ĉiel-árko kaj plurajn similajn.

Distinge de la prononco, tre unueca, la lingva "melodio" ne estas la sama. La plej "neŭtralaj" estas Zagrebo kaj Berno, laŭ mia lingvosento. La aliaj transportas en Esperanton la melodiojn de siaj naciaj lingvoj. Tio ne nur ne estas ĝena el kiu ajn vidpunkto, sed, kontraŭe, donas apartan ĉarmon al la tuto de la elsendoj kaj, pli vaste, al la Internacia Lingvo.

Ivo Lapenna

Abonu kaj havigu novajn abonantojn al **HORIZONTO**, la revuo de la
NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO, por ke ĝi povu eĉ pli efike
 ol ĝis nun plenumi sian rolon de sentinelo de la partipolitika
 neŭtrala esperantismo.

NORDA PRINTEMPO



Ho, norda printempo, amo ĉe l'unua ekvido, junaĝe gracia feliĉo kaj fido.
Ĉu vi memoras, naturo de l'florar', norda obstina patrino, ekspozicion de
via dekoltita sino?

Forpase murmuris via printempo suda, en mian hejmon venu, gustumu
forton el sukoj freŝaj, ekpluku amon, strebon, deziron, silentosone
vi pepis kaj tamen ravita de via voĉo burdo hirtulo haltis survoje
al nupto polena.

Via printempo min logas, norda reĝin' de l'belo, simile al bunta ĝardeno
el fantazi'fabelo. En via verda regno spiras hipnotigita logo kvazaŭ
parfumitaj rozoj kaj manoj kiuj amas kultivas unuenaskajn filojn de sentemaj
mimozoj.

Sciu, ekstaza reĝino natur', mi estas nur homo, parto de l'homaraj
sentoj, mi suĉas paradizpetalojn kaj ne velkintajn florojn de verde
sovaĝaj koroj.

Ĉu siringaj lustroj, odorboteletoj de l'plej luksa speco, pendantaj grapoloj
de miksa koloro, estas la subuloj de via potenco? Aŭ petolaj rivaloj de l'
princina gloro?

La domojn vi kaŝis, ho, patrin' de l'pompo, sub ekflorintaj arboj
kaj arbustoj, kvazaŭ vi volus renversi abismen kaj homojn kaj
domojn, formikojn kaj bovojn. Ĉu troviĝas iu kiu arde celas ke
naturkolekto izolite ploru?

Blovas la marvento, balancetas branĉojn de ŝmiritaj damoj kaj la sveltajn
turojn de l'koketkasteloj sur teksita bildo de herboj kaj floroj.

Ĉu animaj voko kaj mirindaj krioj de scivolaj idoj eĥas en la
parkoj de l'distra ekscito? Ĉu nur tie dancas narkotitaj filoj
rotacias ĉare ĝis ĉielfirmaĵo kaj parade kuras tra burleskaj ejoj?
Al cirkaj festenoj la benon vi donu, la postajn dolorojn kial ni
ekkonu?

En Kronborg kastelo salutis min dolĉe la princo Hamleta kaj vi, ho, naturo,
martere sterninta.

Ofelio sorĉa kaj fortune rava, moderna feino el rev' forpasinta,
balbutis reĝido lulkanton adoran, sur la vivscenejo ni prezentu kune
miraĝon amoran.

Hamleto obstina, vente mi susuris, neniam mi estis sperta aktorino,
kaj flustrante dampe por ke la naturo ne tro ekscitiĝu:

Egalrajt' batalo virine proklama ĉu fariĝus fama se nune plorĝemus
Ofelio ama?

Nobelridetante la Hamleta princo per la lipoj tuŝis miajn vangojn molajn
kvazaŭ la zefiro volus ion diri:

Ĉu esti aŭ ne esti, staras la demando kiu min turmentas. Kia ironio
genio Ŝekspira! Tra l'palaco luksa turistsensacie miaj ostoj pavas.

La intenco via estis ja alia: krimintojn mi devis serĉi detektive.
Kaj svelta figuro de l'tempaĝa princo kun kranio morta en senmorta mano
svingante salutis:

Bonvojaĝon ino, atoma kaj sata, salutu printempon de la lando frata.
Karese mi kisis ĉi belegan landon lagan kaj arbaran, bajbaje luluis lulilon
Vermlandan, la patrinan sinon de Berling kaj Selma; konsola duopo de mia
animo dum ĝi sole ploris en foro estinta.

Kaj tiel plu kaj plue mi vagadis ĝoje tra la vasta regno de via beleco,
mi ne povis halti, pelis vi min pluen tra tenera varmo de valaj
tapiŝoj, trans montaraj pintoj vestitaj en ĉarmo.

Multaj printempoj pasis, amata norda naturo, sub via ŝirmo mi floris kaj
kreskis kvazaŭ olda kverko, centjara fago aŭ alta abio kaj disŝirita reto
de miaj radikoj fortaj konstante liveras sukojn

el l'tero vikinge boaca

el l'fonto genie sagaca.



Esperanto en Radio

Suplemente al la antaŭa artikolo pri Esperanto-elsendoj en radio ni sube donas laŭ ricevitaj informoj liston de tiaj elsendoj kun horindikoj laŭ Greenwich-tempo. Stacioj, kiuj estas nur loke aŭdeblaj ne estas menciitaj.

Ĉiutage

05.00-05.30 Varsovio, 200 m (1530 kHz), 75.85 m (3955 kHz), 50.04 m (5995 kHz),
48.90 m (6135 kHz), 41.27 m (7270 kHz)

11.00-11.30 Pekino, 30.42 m (9860 kHz), 19.34 m (15510 kHz)

13.00-13.30 Pekino, 25.67 m (11685 kHz), 19.81 m (15145 kHz)

15.30-16.00 Varsovio, 42.11 m (7125 kHz), 31.50 m (9525 kHz)

20.00-20.30 Pekino, 32.00 m (9365 kHz), 30.10 m (9965 kHz), 26.21 m (11445 kHz)

21.30-22.00 Varsovio, 200 m (1503 kHz), 75.85 m (3955 kHz), 50.04 m (5995 kHz),
49.22 m (6096 kHz), 41.18 m (7285 kHz)

22.30-23.00 Pekino, 26.05 m (11515 kHz), 19.78 m (15165 kHz)

Dimanĉe

05.45-05.55 Vieno, 48.74 m (6155 kHz), 19.66 m (15260 kHz), 13.90 m (21575 kHz)

19.05-19.15 Vatikano, 196 m (1530 kHz), 48.47 m (6190 kHz), 41.38 m (7250 kHz),
31.17 m (9625 kHz), 31.10 m (9645 kHz), 25.64 m (11700 kHz),
19.84 m (15120 kHz)

Lunde

18.00-18.10 Berno, 75.28 m (3985 kHz), 48.66 m (6165 kHz), 31.46 m (9535 kHz)

20.30-20.40 Berno, 75.28 m (3985 kHz), 48.66 m (6165 kHz), 31.46 m (9535 kHz)

Marde

22.45-23.00 Zagrebo, 262 m (1143 kHz)

Ĵaŭde

05.10-05.25 Vatikano, 196 m (1530 kHz), 48.30 m (6210 kHz), 41.38 m (7250 kHz),
31.17 m (9625 kHz), 31.10 m (9645 kHz), 25.61 m (11715 kHz),
25.55 m (11740 kHz), 19.84 m (15120 kHz).

18.00-18.10 Berno, ondolongoj kiel lunde je la sama horo.

20.30-20.40 Berno, ondolongoj kiel lunde je la sama horo.

Sabate

16.45-16.55 Vieno, 48.74 m (6155 kHz), 30.71 m (9770 kHz), 19.28 m (15560 kHz)

18.00-18.10 Berno, ondolongoj kiel lunde je la sama horo.

20.00-20.20 Romo, 41.24 m (7275 kHz), 41.15 m (7290 kHz), 31.33 m (9575 kHz)

20.30-20.40 Berno, ondolongoj kiel lunde je la sama horo.

Adresoj de la stacioj

Por ke vi povu skribi al la Esperanto-redakcioj de la radiostacioj pri via opinio pri la elsendoj, pri eventualaj proponoj pri programoj, pri la aŭdebleco k.t.p., ni donas la adresojn de la supre menciitaj stacioj:

Varsovio. Radio Polonia, Esperanto-Redakcio, Poŝtkesto 46, PL-00950 Warszawa, Polio.

Pekino. Radio Pekino, Esperanto-fako, Pekino, Popola Respubliko Ĉinio.

Vieno. ORF, Esperanto, A-1136 Wien, Aŭstrio.

Vatikano. Radio Vaticana, Esperanto-fako, Piazza Pia 3, I-00193 Romo, Italio.

Berno. Svisa Radio Internacia, Esperanto-fako, CH-3000 Bern 15, Svisio.

Zagrebo. Radio Zagreb, Esperanto-fako, Zagreb, Jugoslavio.

Romo. Radio Roma, Esperanto, C.P. 320, I-00100 Roma Centro Corr., Italio.

RADIO VIENO

En novembro Radio Vieno havos la jenan programon de siaj Esperanto-disaŭdigoj sabate 16.45-16.57 kun ripeto dimanĉe 05.45-05.57 laŭ Greenwich-tempo:

07/08 D-ro J. Hartl, "Ĉu teknika progreso aŭ plenokupiteco?", 1-a parto.

14/15 La sama, 2-a parto.

21/22 Max Finkenzeller, "Poŝtafranka ekspozicio, Vieno 1981".

28/29 D-ro A. Halbedl, "Helpo al la homaro".

Ondolongoj: sabate 49 m, 31 m kaj 19 m, dimanĉe 49 m, 25 m kaj 16 m.

Se vi ne povas kapti kontentige la disaŭdigojn, petu de Radio Vieno senkoston alsendon de la koncerna por vi interesa teksto. Sufiĉa adreso estas: ORF-Wien-Esperanto-Aŭstrio.

Uni povas peti alsendon ankaŭ de tekstoj de la nur regione aŭdeblaj disaŭdigoj. Por novembro estas anoncitaj jenaj programoj:

03 D-ro K. Beckmann, Recenzo de "Vjetnama Socialisma Respubliko".

17 Mag. Herbert Mayer, Recenzo de la Esperanta traduko de "Skizoj" de Peter Altenberg.

24 Du folkloraj ĉinaj rakontetoj (disponigis Radio Pekino).

HORIZONTO ESTAS VIA REVUO. SUBTENU ĜIN!

TAGO DE LA ESPERANTA LIBRO

Estas tradicio en la Esperanto-Movado celebri la naskiĝtagon de *D-ro Zamenhof*, la 15-an de decembro, kiel Tagon de la Esperanta Libro.

Ne forgesu je tiu tago aĉeti por vi mem aŭ kiel donacon por alia valoran Esperantan libron. La anonco sur la lasta kovrilpaĝo povas doni al vi bonajn ideojn tiurilate.



KVAR OFTAJ ERAROJ

Sub influo de siaj naciaj lingvoj eĉ tre bonaj sciantoj de Esperanto, inkluzive verkistojn kaj redaktorojn de periodaĵoj, konstante faras sufiĉe multajn erarojn, facile eviteblajn. Jen nur kvar el ili:

1. *Mank/i*. - Oni povas legi, precipe en tekstoj skribitaj de hispanlingvanoj, "man-
kas homojn, rimedojn, spacon" ktp. *Mank/i* estas netransitiva verbo. Estas grava
eraro uzi ĝin kiel transitivan. Sekve oni devas diri kaj skribi: mankas homoj, ri-
medoj, spaco, ktp.

2. *Oportun/a*. - Esperantistoj, kies hejma lingvo estas la angla, tre ofte uzas tiun
vorton erare. Kvankam por la angla *opportune* oni povas en kelkaj kuntekstoj diri
en Esperanto *oportuna*, tamen la angla *opportunity* signifas *okazo* aŭ *ŝanco*, nepre
ne *oportuno*, kiel oni ofte legas kaj aŭdas.

3. *Skrib/i*. - En la kroata tiu ĉi verbo povas esti transitiva kaj netransitiva,
fakte verbo de stato kiel en Esperanto la verbigitaj *pluvas, neĝas*, ks. Sekve en
la kroata oni povas diri "skribi leteron" kaj "skribas en la letero, gazeto, li-
bro" ktp. En Esperanto *skrib/i* estas transitiva kaj la formo "*skribas en la lete-
ro, gazeto, libro*" ktp., kiun uzas eĉ Radio Zagreb, estas grave erara. Por tiu
sensubjekta senco oni devas uzi en Esperanto nur la adverbajn pasivajn participojn,
do: estas skribite en la letero, libro, gazeto, ktp.

4. *...ĝis ne*. - Sub influo de siaj respektivaj slavaj lingvoj, eble ankaŭ de ali-
aj, tre multaj esperantistoj el tiuj landoj ĉiam uzas *ĝis ne* anstataŭ *ĝis* ne nur
en kazoj de negaciaj ĉefpropozicioj ("mi ne manĝos ĝis vi ne venos"), sed ankaŭ
en tiu de pozitivaj ("mi legos ĝis vi ne revenos"). Eĉ Kabe skribis: "Mi ne kre-
dos al viaj vortoj, ĝis vi ne donos pruvojn" (citita laŭ PIV). En Esperanto tio
estas ne nur grava eraro, sed ankaŭ sensenca. *Ĝis* en Esperanto estas aŭ prepozi-
cio, montranta la punkton, kiun la ago atingas, aŭ subjunkcio, signifanta la fi-
non de daŭra ago per monstro de alia momenta ago (PIV). Sekve, oni devas diri: Mi
ne manĝos, *ĝis vi venos*; mi legos *ĝis vi revenos*; mi ne kredos al viaj vortoj,
ĝis vi donos pruvojn.

NOTO: En la sekvanta n-ro ni donos kelkajn simplajn konsilojn por korekta uzado
de la pasivaj participoj.

**HORIZONTO kaj la INTERNACIA CENTRO de N.E.M. laboras sen salajrataj oficistoj kaj sen
subvencioj de kiu ajn flanko. Viaj abono al HORIZONTO kaj aliĝo al la CENTRO estas
la solaj enspezoj, kiuj ebligas la regulan aperadon de HORIZONTO.**

KION SIGNIFAS "FOTOGRAFIO"?

Bernard Golden

En la ĉeĥoslovakia periodaĵo *Starto* aperis eraro, kiu altiris mian atenton, ĉar mi jam renkontis ĝin en alilandaj Esperanto-publikigaĵoj. Jen la teksto.

"Sube fotografio el kunveno de gelernantoj de koresponda kurzo en Poděbrady en majo tiuĉijare."

"Kurzo" certe estas preseraro anstataŭ la ĝusta "kurso". La grava afero estas la misuzo de la vorto "fotografio". Komparu la sekvan citaĵon el la hungara Esperanto-revuo *Budapeŝta Informilo*.

"...ni petas ĉiujn, kiuj posedas dokumentojn, fotografiojn, rememorojn...bonvolu pruntedoni la valcraĵojn."

Laŭ *Plena Ilustrita Vortaro* (PIV) "fotografio" signifas "arto de fotografado kaj ĉiuj kun ĝi ligitaj laboroj", do ĝi ne estas la rezulto de la fotografado. "Fotografio" estas formita per la aldono de la internacia sufikso "-i" al la radiko "fotograf-". Tiu ĉi sufikso, laŭ la dua difino en PIV (p. 406) formas sciencajn nomojn surbaze de (a) la nomo de la sciencisto kaj (b) la nomo de la karakteriza instrumento. PIV neglektas klarigi, ke la sufikso povas esti uzata ankaŭ kun verbo priskribante teknikan agon, ekzemple kun la radikoj "stenegraf-", "litograf-" kaj, kompreneble, "fotograf-". En la pli frua *Plena Vortaro* (PV) "fotografio" estis traktita kiel aparta radiko. La vorto estis oficialigita de la Akademio de Esperanto en la Oka Oficiala Aldono al la *Universala Vortaro* (1974).

Sinonimoj de "fotografio" estas "fotografado" kaj "fotografarto". Tiuj ĉi kaj ĉiuj aliaj pluformitaj vortoj baziĝas sur la radiko "fotograf-", kiu laŭ la oficiala vortformada teorio en Esperanto estas verba radiko. Sekve, por formi la vorton por "bildo farita per fotografado" oni tutsimple aldonas la sufikson "-aĵ" al la radiko kaj oni ricevas "fotografajo", la vorton, kiu devis esti uzata en la du frazoj cititaj ĉi-supre. Kial do okazis erara uzo de "fotografio"? Rigardante la sekvan liston da vortoj, oni konstatas, ke la influo de etnolingvaj formoj estas la kaŭzo.

FOTOGRAFIA	itala, hispana, portugala, pola, slovaka
FOTOGRAFIJA	rusa, bulgara, serbokroata, slovena, makedona, latva
FOTOGRAFIE	ĉeĥa, nederlanda, rumana
FOTOGRAFI	sveda, norvega, dana
PHOTOGRAPHIA	latina, greka
PHOTOGRAPHIE	franca, germana
PHOTOGRAPH	angla

Simila problemo estiĝas rilate la ĝustan uzon de "fotografo". Legu la sekvajn frazojn.

"...ni kiu produktas la revuon (kunlaborantoj, kompostistoj, enpaĝiganto, fotografo, presisto...)" (Esperanto)

"La aŭtoro estas renoma fotografo..." (Jarlibro de UEA)

Laŭ PIV la substantivigita formo de la verba radiko "fotograf-" estas "fotografo" aŭ "fotografado", kaj ĝi havas nur unu signifon: "la ago de fotografanto". Oni konsultu la vortaron ĉe la kapvortoj "fotograf-" kaj "-graf" (internacia scienca sufikso). La uzo de la vortformo "fotografo" kun la signifo "persono, kiu fotografas" estas denove la rezulto de etnolingvaj influoj.

FOTOGRAF	rusa, bulgara, pola, ĉeĥa, serbokroata, makedona, slovaka, rumana, sveda, norvega, dana
FOTOGRAFĤS	latva
FOTOGRAAF	nederlanda
FOTOGRAFO	itala, hispana, portugala
FOTOGRAFISTA	slovena
PHOTOGRAPH	germana
PHOTOGRAPHE	franca
PHOTOGRAPHER	angla

PV kaj kelkaj etnolingvaj Esperanto-vortaroj registras "fotografo" kun la signifo "persono, kies profesio estas fotografi", sed tiu uzo implicas,

- (1) ke ekzistas ankaŭ substantiva radiko "fotograf-", kiu funkcias kiel nomo de specialisto same kiel "geografo", "tipografo" kaj "leksikografo"

aŭ

- (2) ke "fotograf-" estas hibrida radiko, parte verba, parte substantiva.

Tiu senbezona komplikaĵo estas nur balasto en Esperanto; unu radiko sufiĉas por logike pluformi ĉiujn aliajn vortojn. Nun leviĝas la demando: ĉu la radiko estu verba aŭ substantiva? La plimulto da eŭropaj lingvoj subtenas la internaciecon de "fotografo" por la nomo de la specialisto, do oni povas argumenti, ke "fotografisto" tute ne estas internacia formo. Tamen, ĝi estas regule pluformita laŭ maniero, kiu karakterizas la vortformadon en Esperanto. Cetere, la verba radiko havas la apogon de tre grava fonto, verko de Zamenhof mem. En §32 de la *Ekzercaro* troviĝas la frazo: *"La fotografisto fotografis min, kaj mi sendis mian fotograf-fajon al mia patro."* Alia eblo estas la formo "fotografiisto", pluformita surbaze de la nun oficiala radiko "fotografi-", sed ĝi estas tre malofte uzata. La-state mi trovis tiun ĉi ekzemplon.

"La rolo de kriminalist-fotografiisto estas ankaŭ grava." (Sciencaj Komunikaĵoj).

Certe la hiato "ii" malhelpas la enradikiĝon de "iist"-vortoj en Esperanto:

"anarkiisto" estas pli ofte anstataŭigata per "anarkisto" kaj "imperialisto" aŭdiĝas pli ofte ol "imperiisto". Tamen, estas esceptoj kiel "historiisto" kaj "me-tiisto", kiuj ne havas aliajn formojn.

Unu elirejo aŭ elturniĝo por tiuj, kiuj sentas konfuzon rilate la uzon de "fotografio" kaj "fotografo", estas pluformi vortojn per la mallongigita kaj nuntempe tre populara radiko "fot-", kiu donas la serion: "foti, fotado, foto, fotisto, fotilo, fotejo."

Julio 1981

Bernard Golden

Aliĝu al la 8-a Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado.

La Provizora Programo promesas al vi treege interesan semajnon sub la brila suno de Hispanio!

Mallonge el la tuta Mondo

LA ESPERANTOLOGIO ĈE LA UNIVERSITATO DE HAJFA

La Programo de Jidaj Studoj de la Universitato Hajfa komencis longdaŭran esplorprojekton pri la judaj aspektoj de Esperanto. La projekto pritraktas temojn, kiel ekz. eblan jidan aŭ hebrean influon ĉe Esperanto, la vivon de L.L. Zamenhof kaj aliajn judajn Esperantistojn, la Esperantismon ĉe judoj, Esperantismon en Israellando, problemojn de la tradukado de la Esperanta literaturo en judajn lingvojn kaj inverse, la judinteresan Esperantan literaturon, Esperantajn vortojn de juda intereso, ligojn inter la kontraŭ-Esperantismo kaj la kontraŭ-judismo, la subpremon de Esperanto sub Hitler kaj Stalin -- resume, ian ajn temon, kiu kunigas la Esperantan kaj la judan intereson.

D-ro David L. Gold, kiu respondecas pri la esplorado, referatis pri kelkaj el tiuj temoj ĉe la Unua Internacia Konferenco pri Esperantologio (Budapeŝto, julio 1978); plilongigita versio de la referato aperis en *Miscellanea Interlingvistika* (red. István Szerdahelyi, Budapeŝto, 1980). Kroma referato, "Plie pri Judaj Aspektoj de Esperanto" baldaŭ finverkiĝos.

Por provizi al la israelaj esperantologoj ĝenerale kaj al la esplorantoj pri la judaj aspektoj de Esperanto aparte esplormaterialojn, la Programo de Jidaj Studoj nun petas la kontribuadon de eldonitaj aŭ ne-eldonitaj buŝaj aŭ skribaj materialoj en aŭ pri Esperanto (ĉu de juda intereso aŭ ne). Tiuj, kiuj emus kontribui originalajn aŭ fotokopiajn materialojn skribu al: D-ro David L. Gold / Yiddish Studies Program / University of Haifa / Mount Carmel / Haifa 31 999 / Israel.

PRO KIO ASOCIO DE INVALIDAJ ESPERANTISTOJ?

La jaro 1981 estis proklamita de UN *Jaro de handikapitoj*, kaj ĉar tion faris plejparte tiuj, kiuj ne suferas pro handikapiteco, la rezulto estos tre modesta kaj konsistos plejparte el tio, ke oni publikigos plurajn artikolojn pri problemoj de handikapitoj, ne farante ion konkretan por plifaciligi nian sorton. Ekz. oni konstruis en nia jaro eĉ ne unu novan domon, ne plivastigis nian socian protekton, ne plibonigis trafikilojn por facila uzo al ni ktp., ktp.

La sama situacio estas ĉe Esperanto-instancoj, kiuj ĉefe pere de siaj gazetoj publikigis originalajn aŭ represajn artikolojn ne investante sian pensenergiecon por trovi bonajn flankojn, kiujn prezentas la Internacia Lingvo por handikapitoj. Eĉ ne unu Esperanto-instanco dediĉis sian kongreson, seminarion, renkontiĝon ks. al la problemoj de handikapitoj.

Krom tio, dum diversaj Esperanto-aranĝoj, en Esperanto-societoj kaj organizoj ne ĉesis oftaj primokaj rigardoj, malkomprenemo kaj eĉ maltoleremo. Handikapitoj restos ankaŭ plue solaj kaj solecaj, dum ili silentos kaj atendos, ke iu alia solvu iliajn problemojn sen ilia aktiva partopreno en tio. Pro tio mi pledas, ke ni helpu unuj al la aliaj pere de fondo de la *Internacia Asocio de Handikapitaj Esperantistoj*.

Pri tio estas eldonita 5-paĝa cirkulero kun detalaj informoj, kiun bonvolu peti de la subskribinto, kies adreso estas: Školska ul. 25, YU-56227 Borovo, Jugoslavio.

Dušan Adnadj,

Redakcia noto: S-ro Adnadj estas ekonomikisto, invalido, dum multaj jaroj aktiva en la jugoslavia Esperanto-movado. I.a. li estas la fondinto kaj responsa redaktoro de la Jugoslavia Esperanto-Revuo "Voĉo".

Lastmomente

KVINJARA PLANO DE U.E.A.

Centra Bulteno, eldonata de Esperanto-Centro, Aarhus, Danio, enhavas en n-ro 197 la tekston de la *Plano de UEA por la Periodo 1983-87* aprobita de la Komitato de UEA en Brazilio kaj publikigota en la oktobra numero de la revuo *Esperanto*. La bulteno informas, ke "tuj poste la prezidanto de UEA skribos al diversaj Esp.-organizaĵoj (SAT, NEM, ILEI ks.) kaj al la diversaj fakaj organizaĵoj en UEA por proponi ĝeneralan kunlaboron".

En la venonta numero de *Horizonto* (post ricevo de la letero de la UEA-prezidanto) aperos la teksto de la plano kun komento.



ESPERANTO UNUAFOJE EN INTERNACIA POEZIA FESTIVALO

En Roterdamo la monato Junio estas la pompa tempo de la Nederlanda festivalo. En ties kadro okazis ĉi-jare dum la semajno de la 14-a ĝis la 21-a de Junio jam la dek-duan fojon la INTERNACIA POEZIA FESTIVALO ("Poetry International Festival"), kies areno estis la teatro ("Schouwburg") de la urbo. Tridek poetoj de internacia rango kaj renomo el dudek-tri diversaj landoj estis invititaj kaj disponis pri la ŝanco voĉe legi mem provaĵojn el sia verko aŭ lasi legi ilin kiel tradukitajn.

Estis mirige por la referanto sperti, ke ekzistas publiko, sufiĉe multnombra por konvene plenigi la vastan spektantejon kaj inklina por aŭskulti poemojn dum tuta semajno kaj ĉe neniel modestaj prezoj por la biletoj, ĉiuvespere de la 20a horo ĝis la 23a kaj pli longe, ofte eĉ en lingvoj de ĝi tute nekonataj.

Tute speciale oni honoris la grizharan Eriko Arento (Erich Arendt, naskita en 1903) el la Germana Demokrata Respubliko. Ĉi tie ŝajnas necese insisti pri la fakto, ke la aranĝoj estis sen iu ajn politike ideologia tendenco. Tri poemoj de Eriko Arento estis elektitaj - LA MANOJ ("Die Hände"), CAVA ACQUERA kaj POR UNUIGA HELO ("Einhelligem...") - por esti tradukotaj en preskaŭ ĉiujn lingvojn reprezentatajn de la ĉeestantaj poetoj kaj por esti konigitaj al la publiko. Dum horojn daŭrantaj kolokvoj kaj en la ĉeesto de Eriko Arento, kiu komplezeme liveris la necesajn informojn, la poemoj estis detale priparolataj de la kunlaborantaj poetoj, kiuj tiamaniere, kvazaŭ malantaŭ la kulisoj, povis prepari sin al sia traduka tasko.

La ĉitiumjara Poezia Festivalo ricevis tute apartan markon pro tio, ke unuafoje ankaŭ Esperanto estis akceptita kiel traduka lingvo. Tiel la referanto, sekvinte la inviton de Nederlandaj Esperantistoj, havis la okazon voĉe legi la poemon LA MANOJ de Eriko Arento en la Internacia Lingvo. Krome estis publikigita en la programkajeroj lia Esperantigo de CAVA ACQUERA.

Dezirinde ja estas, ke la aranĝinta societo, nome la Roterdama Artofondado ("Rotterdamse Kunststichting") iam ekkonu, ke Esperanto disponas pri konsiderinda originala poezio kaj ke ĝi vere meritas esti allasata ĉe venontaj festivaloj ankaŭ kiel poezia originala lingvo.

Rikardo Sulco, Mindeno

8-a INTERNACIA KONFERENCO de la NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO

PROVIZORA PROGRAMO

Tempo

De sabato la 31-a de julio ĝis sabato la 7-a de aŭgusto 1982.

Loko

Villafranca del Panadés (ĉ. 22.000 loĝantoj) en multcentjara kataluna vindistrikto, ĉ. 45 km okcidente de Barcelono, Hispanio.

Ĉeftemo

Kontribuo de NEM al la Esperanto-Jaro 1987 konforme al la Baza Programo akceptita de la 7-a Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado.

Subtemoj

- (1) Science korekta prezento de la Internacia Lingvo
- (2) Karaktero de informado pri la Internacia Lingvo
- (3) Rolo de Hispana Esperanto-Muzeo kiel esplora kaj dokumenta institucio de la sendependa kaj neŭtrala Esperanto-Movado.
- (4) Eventuale aliaj demandoj.

Prelegantoj

La nomoj de la prelegantoj, kiuj enkondukos la unuopajn subtemojn, estos komunikitaj en la definitiva programo. Ĝis nun Prof. D-ro Ivo Lapenna akceptis fari la inaŭguran paroladon kaj enkonduki la subtemon (1), kaj s-ro Luis M. Hernández-Yzal, la fondinto kaj estro de la Hispana Esperanto-Muzeo, enkondukos la subtemon (3).

Aliaj aranĝoj

Interkona Vespero kun arta programo; Bankedo kaj Internacia Balo; Ekskursoj kaj vizitoj al muzeoj, i.a. al la Hispana Esperanto-Muzeo en Sant Pau d'Ordal; Ĉefkunveno de Internacia Centro de la Neŭtrala Esperanto-Movado; Ĉefkunveno de Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj (verŝajne); Kataluna Folkloro Vespero.

Kotizoj kaj loĝado

Vidu la enmetitan aliĝilon.

Aliĝilojn akceptas kaj ĉiujn informojn donas la Prezidanto de la Loka Organiza Komitato, s-ro Luis M. Hernández-Yzal, Poŝtkesto 83, Villafranca del Panadés (Barcelona), Hispanio.

PARDONPETOJ

La sekretario-kasisto de la Plenuma Komitato de Internacia Centro de la Neŭtrala Esperanto-Movado, la (help)redaktoro de *Horizonto*, la prezidanto-kasisto de la Loka Organiza Komitato de la 7-a Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado kaj la sekretario de la Prezidentaro de tiu konferenco, alivorte la subskribinto, tre bedaŭras, ke li pro la transpreno de tiuj tro multaj taskoj kompare kun lia limigita libera tempo ne kapablis, nek kapablas respondi al ĉiuj ricevitaj leteroj k.c. tiel rapide, kiel decas en serioze laboranta movado. Vere ankoraŭ multaj personoj prave povas plendi pro manko de respondo. Tial, esperante pri kompreno de mia situacio, mi petas pardonon.

La taskoj rilate al la finita konferenco espereble baldaŭ estos plenumitaj, kaj mi klopodas kune kun miaj kunlaborantoj ŝanĝi la laborprocedurojn en maniero, kiu ebligas al mi prizorgi miajn taskojn bonorde. Ĝis tiam bonvolu pacienci!

Kiel redaktoro responsa pri la enpaĝigo de *Horizonto* mi, plie, bedaŭras la fuŝon pri la artikoleto *Urnes-Stilo* en la antaŭa numero, p. 116. Pro manko de spaco ĝi estis prokrastita je la enpaĝigo de antaŭaj numeroj, kaj kiam fine ĝi estis presita, la lasta alineo estis metita kiel la unua, kio igis la artikoleon iom malfacile komprenebla. Tiu fuŝo verŝajne estis kaŭzita de la fakto, ke necesiĝis ŝanĝi la paĝon, ĉar la foto de la kompleta Urnes-portalo, kiun ni volis prezenti, montriĝis netaŭga por reproduktigo en la revuo. Kaj tio eĉ ne estas ĉio! La tekston verkis mi, kiu ankaŭ kontrolis la presprovaĵon. Tio tamen ne malhelpis, ke en la artikoleto oni legas: "Fakte la kapitulo estis trovita en Norvegio..." La lasta vorto devas esti "Norwich"! Pardonu!

Tria bedaŭro: La tria bildo sur p. 109 montras kvar konferencanojn, sed sub la bildo estas nur tri nomoj, kvankam fakte s-ro Gösta Persson, la plej maldekstre sidanta persono, ne partoprenis la konferencon anonime.

H.V. Rasmussen.

— Por bona
tekniko —

	OFFSET/REPRO/COPY
	ESKOFOT A/S
	35-37 Industriparken
	DK-2750 Ballerup-Denmark
	Telephone 02-974400
	Telex 35 156 esko

— Por bona
servado —

VERKOJ DE IVO LAPENNA

Verkitaj en la Internacia Lingvo.

*Ĉiuj inspiritaj de humaneca
internaciismo.*



Ĉiuj verkitaj en **modela** Esperanto.

El la verkaro de Ivo Lapenna en la kroata, la franca, la angla kaj la Internacia Lingvo kaj japana traduko de Retoriko.

RETORIKO, la plej legata libro de la postmilita periodo, jam pli ol 5.500 ekzempleroj disvenditaj, 3-a eldono, 294 p., bindita, prezo 8 anglaj pundoj, 80 danaj kronoj aŭ egalvaloro, 2-a eldono, bindita, nur 6 anglaj pundoj aŭ 60 danaj kronoj (nur kelkaj ekzempleroj).

ELEKTITAJ PAROLADOJ KAJ PRELEGOJ, komplemento de *Retoriko*, 152 p., fortike broŝurita, prezo 5 anglaj pundoj, 50 danaj kronoj aŭ egalvaloro.

AKTUALAJ PROBLEMOJ DE LA NUNTEMPA INTERNACIA VIVO, polularscienca kaj interesa por ĉiu klera persono, broŝurita, prezo 3 anglaj pundoj, 30 danaj kronoj aŭ egalvaloro.

ESPERANTO EN PERSPEKTIVO (ĉefadtoro kaj ĉefredaktoro), monumenta, reklamata de UEA kiel "enciklopedio de la nuna tempo", tamen ne kompleta sen *Hamburgo en Retrospektivo*, bindita, ilustrita, 876 p., ampleksaj persona kaj tema indeksoj, prezo 84 ned. gld., 215 danaj kronoj aŭ egalvaloro.

HAMBURGO EN RETROSPEKTIVO, konsiderinde kompletigita eldono, lukse broŝurita, 152 p., prezo 5 anglaj pundoj, 50 danaj kronoj, 18 germanaj markoj, 40 fr.fr., 650 pesetoj aŭ egalvaloro.

Prezoj ekde la 1-a de junio 1979. Ĉiuj supraj libroj estas en la sama formato de 20,5 x 14 cm.

Mendeblaj ĉe nia **LIBROSERVO de NEM**, Nørregårdsvej 91, DK-2610 Rødovre, Danlando. Kun ecepto de *Esperanto en Perspektivo*, la librojn oni povas mendi ankaŭ ĉe la *aŭtoro*: 77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex HA9 8TF, Britio, laŭ la prezoj indikitaj en anglaj pundoj.

Krome, unuopaj ekzempleroj de *Hamburgo en Retrospektivo* estas mendeblaj ĉe s-ro *Jean Thierry*, 5, rue Léon Cogniet, F-75017 Paris, Francio, aŭ ĉe bonaj libroservoj. Pli grandaj kvantoj mendeblaj nur ĉe **ELDONEJO PERSPEKTIVO**, Nørregårdsvej 91, DK-2610 Rødovre, Danlando, kun jenaj rabatoj: 33% ĉe mendo de minimume 5 ekzempleroj plus 10% por afranko, 33% sen afranko ĉe mendo de minimume 10 ekzempleroj.

En ĉiuj aliaj kazoj bonvolu ĉiam aldoni 10% por la afranko.

LA SUPRAJ VERKOJ DE IVO LAPENNA estas pli aktualaj nuntempe ol iam antaŭe. Ili donas klaran, science bazitan eksplikon pri la esenco de la Internacia Lingvo (Esperanto), pri ĝia rolo en la hodiaŭaj kaj estontaj internaciaj rilatoj kaj pri ĝia monde solidara funkcio. Samtempe, kune kun liaj artikoloj en *HORIZONTO*, ili estas la plej trafa respondo al la pseudosciencaj skribaĵoj de la sovetiaj maj ideologoj en la posthamburga UEA kaj ĝenerale en la Esperanto-Movado.

MENDU TUJ KAJ ATENTIGU VIAJN GEAMIKOJN

Helpu pluporti la torĉon de la *zamenhoja esperantismo*

LIBROSERVO DE LA NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO
Nørregårdsvej 91, DK-2610 Rødovre, Danlando.